

# EKO 2023



Nia aganto pri  
instruado kaj  
progreso

**Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro**

**Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj**



**EKO 2023 / 43. Julio 23 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj (lingva kontrolo): Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbeglo Koffi.**

**Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 410 KB. Sume: 450 KB**

## Detale pri AMO 102

Jen la nuna stato de la programo, kun temo 'Interkulturo en lernejoj' en la 11-a de aŭgusto en la Kongreso de ILEI en Lignano. Ligilo sekvos.

14.30 –15.15 Prezentaĵo SMG pri la pionira rolo de Mauro La Torre kaj aliaj.

15.15 –15.45 Surprizo de ILEI

15.45 –16.00 Muzika paŭzo de Clarissa Sabatini.

16.00 –16.30 Ni realigas la virtualan lernejon Szekelj Tibor

16.30 –16.50 ILEI kaj ĝiaj landaj sekcioj

16.50 –17.00 Muzika filmeto

17.00 –17.30 Mireille Grosjean: Interkulturo kaj Japanio.

## Enkonduko persona

Ĉiuj scias, ke bezonatas naŭ monatoj ĝis embrio, feto kaj finfine bebo pretas kaj naskiĝas. Same longa aŭ eĉ pli longa estas la evoluo por fariĝi esperantisto. De fidela patrioto al tutmonda familiero iu persono ŝanĝas sian sintenon same kiel raŭpo fariĝas papilio. Paralele venas la okazo konatiĝi kun homoj de aliaj kulturoj. Kulturŝoko! Komenciĝas pripensoj: kiu mi estas ? kiel la aliuloj vidas min ? Kion ili scias aŭ kredas pri mia kulturo? Kia estas mia kulturo? Kiel mi konduku kun ili? Ĉu mi rajtas starigi demandojn? Ĉu mi rajtas fari komentojn ? Esprimi surprizojn... Tia vojo povas timigi kaj malstabiligi diversajn personojn. Pro tio hezitemuloj restas hejme por ne sperti tiajn ĝenajn sentojn. Tiaj personoj ne lernas Esperanton. Ni lernis Esperanton, laŭ tio oni povus indukti, ke ni ne timas la kontaktojn kun nekonataj homoj. Tutkomence kaj baze ni estas kuraĝaj kaj scivolemaj. Sed tio ne implicas, ke ni havas la bezonatan respekton por harmonie rilati kun homoj de aliaj kulturoj. Tiaj situacioj postulas iom pli ol simplan scivolemon. Tion ni esploras en Lignano okaze de la Aktivula Maturigo pri interkulturaj rilatoj.

Vidpunkto de Laura Brazzabeni, estraranino de ILEI.

## AMO 101 en BET 58 kun 45 partoprenantoj

Komenciĝas la dua cento da AMO-seminarioj per AMO 101, okazinta en la 18-a de julio en Ventspils, Latvio kun la temo: 'Por plia dinamika medio por baltaj Eo-istoj'. La enkonduka prezentaĵo de SMG havas temaron, kiu utilis ankaŭ por landaj asocioj. Ĝi prezentis la dinamikigajn rekomendojn kun la sekvaj subtemoj: Kursoj, Informado, Kontaktoj, Kunlaboro kaj Komunikado.

En la seminario estis reprezentita UEA per estrarano Jeremie Sabiyumva el Burundo, ILEI per sia prezidanto Ahmad Mamduhi el Irano kaj la aktiva AMO-komisiono per sia kroata membro Marija Beloŝeviĉ. Jeremie raportis, ke la TEJO-sekcio en Litovio, kiu havas sukcesojn ĉe la Universitato de la Tria Aĝo. Li raportis ankaŭ pri vojaĝo turisma al Bialistoko, en kiu partoprenis pluraj esperantistoj. Ili ripetos tion kun vojaĝo en 2024 al Parizo, kiu povos konigi la bonojn de Esperanto. En la seminario partoprenis ĉ. 45 personoj: proks. 20 surloke en BET 58, kie okazis la seminario, proks. dek kune en Zagrebo, kiuj partoprenis rete kaj grupe, kaj la ceteraj unuopuloj, kiuj partoprenis rete, kaj aktive kontribuis al la diskutoj. Partoprenintoj venis el naŭ landoj: Burundo, Estonio, Finnlando, Hungario, Irano, Kroatio, Latvio, Litovio kaj Tanzanio. Ĉeestis la reprezentanto de Estonio, Tonu Hirsik, Estonio gastigos BET 59 en universitata urbo Tartu. Intervenis Tuomo Grundstrom el Finnlando, kiu raportis pri 4-5 taga kursoj tie.

Protokolis: SMG.

## Vigle fluas la Danubo

Denove, la danuba ret-kunveno pruvis sian valoron per sia julia kunveno. Kiel kutime, unu grupa membro prenas la taskon pretigi prezentaĵon. Ĉi-foje, tiun taskon plenumis Jovan Zarkoviĉ el Serbio. Efektive el la 13 partoprenantoj, la plimulto loĝas en Serbio, kun aldono de Kroatio, Albanio, Rumanio, Hungario kaj Bosnio-Hercegovino, de kie Gradimir Kragiĉ prizorgas la kunsidan serion.

Jovan enkonduke informis, ke en Serbio okazis kursoj je niveloj A1, A2 kaj B. Li raportis, ke la scinivelo pri Esperanto malmultas; la kursanoj aŭdis pri ĝi per *Duolingo* aŭ similaj programoj. Li informis plie, ke la serbaj esperantistoj provas kunlabori kun la prestiĝa Asocio de Tradukistoj kaj havas sian esperantan version de tiu, kiu forte laboras kaj pretigis kvar tradukojn el la serba pretajn por aperigo.

Brazilo kavis aŭdacan planon, ke la Eo-Tago, la 26-a de julio, estu rekonata de Unesko kaj eniru ĝian kalendaron. La danuba grupo apogos tiun ideon; pri tio ĉefe povos okupiĝi Serbio, Kroatio kaj Pollando kaj iu Afrika lando, kiuj havas fortajn ligojn kun la landa agado de Unesko. En Serbio oni jam produktis 3-paĝan apogan dokumenton, prezentitan de la Tradukista Asocio, por ne rekte ligi la pledon kun esperantistoj. Krome oni partoprenos kunsidon kun Unesko por persone pledi por la akcepto.

Marija Jerkoviĉ el Kroatio kaj estrarano de ILEI, raportis pri la tradukoj el la kroata al Esperanto, el kio rezultis televida intervjuo. Ŝi rakontas pri kursoj en Kroatio. Bardhyl Selimi el Albanio raportis, ke li prelegos pri Esperanto en septembro kaj proponos kurson. Aranka Laslo el norda Serbio raportis, ke tri ret-kursoj venis al fino kun submetiĝo al ekzamenoj. El la sukcesintoj, iuj eniris la estraron de la serba asocio, tiel ke ĝi iĝis ok-membra. Pri Rumanio, Sara Konnerth raportis, ke la ĉefa agado okazadas en la Okcidenta Universitato de Timiŝoara, sub gvido de Manianna Pitar. La aktoro Saŝa Pilipoviĉ proponas fizikan Balkanan Kongreson en 2024 kaj pretas organizi tion. Aranka Laslo raportas pri partopreno en projekto de Erasmus+,

kiu ebligas al ŝi sendi du instruistojn al la Kongreso de ILEI en Lignano. SMG prezentas proponon en AMO 100, ke ekestu simila Rejna-Rodana ret-grupo kun partoprenantoj el Svislando, Germanio, Francio kaj Nederlando. Se tio okazos, la kongreso en Strasburgo en 2024 estos ideala okazo firmigi tiun ideon.

Danubo fluas tra naŭ landoj – *Germanio, Aŭstrio, Slovakio*, Hungario, Kroatio, Serbio, *Bulgario*, Rumanio kaj *Ukrainio*. La kursive indikitaj landoj ne partoprenis ĝis nun en la Eo-retgrupo pri danuba kunlaboro – ili bonvenas!

*PS: Ekstraj Z-poentoj al iu ajn, kiu komprenis la aludon de nia titolo.*

## Mirinda kontribuo de Edistudio

La eldonejo Edistudio en Italio faris mirindan kontribuon al nia agado tra pluraj kontinentoj. Jen la mendeblaĵoj ĉe la libroservo de UEA:

<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?retrovo=&kondicho=chio&trovu=Trovu+en+la+reta+katalogo&katego=&titolo=&auxtoro=&vortoj=&eldonisto=Edistudio&eldloko=&tradukinto=&kontrib=&isbn=&lingva=&post=&antau=&pli=&malpli=&prezo=&mprezo=>

Inter la riĉa elekto en la Libroservo de UEA estas la sekvaj:

- **En barko senpilota** de William Auld el 1987 – kompleta poezia verkaro. (vidu la kovrilon dekstre).
- **Fatomaŝino, La: Ĵan Kokto'**. Tradukis G. Lagranĝ'. Kvarakta dramo kiu parodias la sorton de Edipo.
- **Hodler en Mostar** *Spomenka Ŝtimec*. 2006. 105 paĝoj. Prezo: 15.00 €. Originala romano pri Ferdinand Hodler, la patro de Hector Hodler.
- **Kiel akvo de l' rivero**. *Raymond Schwartz*. 487 paĝoj. Prezo: 16.50 €. Klasika romanego, kun streĉa intrigo kaj humuro.
- **Kolektanto de ĉielarkoj**. Rakontoj kaj poemoj. *Tibor Sekelj*. Prezo: 12.00 €. Kolekto de 16 belstilaj rakontoj kaj 7 poemoj.
- **Lingvo por ĉiuj, Unu, unu lingvo de neniŭ lando**. Surkampa esplorado pri la esperantaj identecoj. *Irene Caligaris*. Antaŭparolo de Federico Gobbo. 424 paĝoj. Prezo: 19.50 €. Ampleksa studo premiita, pri la Esperanta komunumo.
- **Lingvo serena, La**. Plena verkaro de *Baldur Ragnarsson*. M. Nervi, R. Corsetti, M. Boulton, J. Camacho, P. Daŝgupto, E. De Kock, N. Ruggiero, H. Tonkin. 2007. 799 paĝoj. 27.00 €. Originalaj poemoj kaj eseoj de la fama islanda aŭtoro.



## La UK-tutkontinenta organiza teamo kunvenis

Pri la retkunveno de la Tutafrika Kongresa Komitato (TKK), okazinta la 30-an de junio 2023. Oni konsentis, ke regule publikiĝu en la oficiala organo de UEA informoj pri la kongreso kaj pri Afriko ĝenerale. La unuaj artikoloj estois verkitaj kaj jam senditaj al la redakcio. Pro limigita rimedo, la TKK decidis havi relative ne kostan retejon por la kongreso. (SMG: *UEA jam starigis afrikan retejon subtene al la kongreso*). Oni klopodas krei sociajn retojn kaj mastrumi ilin kaj produkti iliajn enhavojn. Tri proponataj emblemoj alvenis; kvin proponoj venis por la kongresa temo. Pri ambaŭ decidis la Estraro de UEA. Estas trovitaj en Francio, Ĉinio, Brazilo, Germanio, Burundo, Tanzanio, Togolando kaj espereble ankaŭ en aliaj landoj “Kongresaj ambasadoroj”. Tiuj ĉi estas entuziasmoj, kiuj akceptis organizi grupan vojaĝon, kuraĝigi homojn aliĝi kaj partopreni la 109-an UK en Aruŝo. Ili

organizos aperigon de artikoloj en la lokaj Esperanto-revuoj, aranĝos programerojn pri la afrika UK dum gravaj eventoj en siaj respektivaj landoj.

Lige al la UK en Aruŝo, TKK diskutis ideon eldoni gravan afrikan literaturaĵon en Esperanto. Oni pensis pri famaj verkoj el Tanzanio aŭ Afriko pli ĝenerale. Estos farataj esploroj por vidi, ĉu fari tradukon de verko de fama aŭtoro, ĉu eldoni iun ĝeneralan trarigardon pri afrikaj aŭtoroj tra la tuta kontinento, aŭ ĉu fokusiĝi pri specifa(j) verko(j) k.s. Similaj esploroj estos farataj pri aliaj artaj kampoj. Oni pensis pri donacetoj, kiuj estu sendotaj al subtenantoj, donacantoj por la kongreso kaj al la homoj, kiuj subtene aliĝas al la kongreso sed ne venos. TKK decidis aĉeton de ĝirafoj (nacia simbolo de Tanzanio). Tiuj ĉi artaĵoj estos uzataj kiel donaco en konkursoj tra la jaro kaj ankaŭ kiel vendaĵo dum la kongresa semajno.

La TKK-sekretario informis pri etaj atingoj dum sia rondvojaĝo tra Eŭropo. Li vojaĝis al kunvenoj pri Esperanto en Germanio, Italio, Francio kaj tie prezentis pri Tanzanio, kiel jam raportis EKO, per filmo. Okazis preparo de afrikanoj por la ĉi-jara UK. La partoprenantaro en la kongreso en Torino estos kiel eble plej internacia, ĉar afrikanoj ricevis vizon kaj povos sukcese vojaĝi kaj ĉeesti la kongreson.

Ĉi tiun retkunvenon partoprenis 9 personoj el 4 landoj, nome Costantine M. (Tanzanio), John M. (Tanzanio), Jérémie S. (Burundo), Gendo F. (Tanzanio), Mulele M. (Tanzanio), Adjévi A. (Togolando), David M. (Tanzanio), Paul K. (Tanzanio), Emile M. (DR Kongo).

Adjévi Adjé

## Malio – nova lando en Afriko kun agado

‘Mia lernejo havas 396 lernantojn en 6 klasoj; mi mem estas instruistino en tiu ĉi lernejo. Mi ne scias la nombron de esperantistoj, ĉar personoj diras ke ili estas esperantistoj sed ne scipovas paroli - skribi. Mi scias ke hodiaŭ mi kaj Fatoumata Tamboura havas lecionojn per sud-franca koresponda kurso de Monpeliero; al Drissa Flayoro ni respondas kaj li korektas. Ankaŭ la 3 pliaĝaj filinoj de Drissa lernas kiel ni.’ diras Mbamoussa Keita el Bamako.

## Fino de la lernojaro 2022-2023 en Instituto Zamenhof

Ĉi tiu lernejo en Lomeo, Togolando, okazigis la jarfinajn ekzamenojn kaj anoncis la rezultojn. En la festa kunveno, la folkloro grupo AGBADJA ludis kaj poste ludis la orkestro de IZO kun dancistoj. La infanvarteja grupo kaj la dua grupo ĝuis 100%-an sukceson. En la duagrada nivelo el 44 studentoj, sukcesis 43. La geinstruistoj jam anoncis feriajn kursojn kaj lernadon de Esperanto en aŭgusto.

Koncizigita el raporto de la kunlaboranto de EKO, Gbeglo Koffi

## Verko de la prezidanto de ILEI

**Plej facila lingvo de la mondo, La.** Persa lernolibro de la internacia lingvo Esperanto. *Ahmad Reza Mamduhi*, Arviĝ. Tehrano. 2005. Prezo: 30.00 €. Ampleksa lernolibro kun abundo da ekzemploj kaj kelkaj ilustraĵoj.

===== 1490 vortoj =====

La kolekto de EKO: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php> por 2023 (ĝis 40).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.